# Komunikoj

JARO 36-a | OKTOBRO - NOVEMBRO - DECEMBRO | N-ro 144 2011



"Amu vian Dion
per via tuta animo
kaj vian proksimulon
kiel vin mem."
Jesuo

**Naskiĝi, morti, renaskiĝi ankoraŭ kaj ĉiam progresi tia estas la leĝo.**

# RETROSPEKTIVO 2011

Ĉe la fino de la jaro, kiam ni retrospektivas pri la agoj de nia Eldonejo, ni trankvile diras ke ni plenumis nian modestan taskon kaj, post 36 jaroj, Lorenz daŭre marŝas antaŭen kaj supren.

La teamo de Lorenz vigle laboradis en 2011! La partopreno en la Universala Kongreso de Esperanto, en Danio, estis tre fruktdona, kiam samideano José Passini prelegis pri "Reenkarniĝo" al pli ol 100 geesperantistoj, el pluraj landoj. En la sama kunsido, tute senpage, ni disdonis Almanakon Lorenz kaj diversajn aliajn spiritismajn librojn al ĉiuj samideanoj. Ankaŭ ni partoprenis la Movadan Foiron, disdonante librojn kaj propagandilojn pri Spiritismo al multaj geamikoj.

Koncerne la Brazilan Kongreson de Esperanto, en San-Paŭlo, la prelegĉambro de la kunveno de Lorenz estis plenplena; tiam, Passini prelegis pri la sama temo de la UK. Notinde estis la budo de Lorenz kun pluraj malmultekostaj varoj. Ankaŭ ni pliantentigas, ke post la prelego de Passini, ni okazigis la Aŭtografan Momenton, kiam Passini kaj Osvaldo Pires de Holanda aŭtografis Almanakon Lorenz.

Alia tre interesa momento de Lorenz en 2011 estis la partopreno en la Duajara Internacia Libro-Foiro de Rio-de-Ĵanejro.

Kompreneble, ni ne povas forgesi la lanĉon, en la portugala lingvo, de la libro de nia karmemora frato, Paulo Roberto Viola, "Princesa Isabel, Uma Viagem no Tempo". Paulo elkarniĝis unu semajno antaŭ la lanĉo de tiu libro kaj, laŭ la volo de la familio, ni efektivigis la lanĉon kaj organizis belan omaĝon al tiu nobla amiko, ĵurnalisto kaj verkisto.

Nia bulteno Komunikoj kaj Almanako Lorenz ankaŭ vojaĝis tra la tuta mondo per Interreto. Pli ol kvar mil gesamideanoj ilin ricevis.

Do, ni facile konstatas ke Eldonejo Lorenz, ankaŭ en 2011, plenumis siajn celojn kaj, se Dio volos kaj la amikoj nin helpos, ni ankaŭ atingos niajn celojn en 2012.


Elkoran dankon al ĉiuj karaj fratoj, amikoj kaj samideanoj!

Dio benu vin!

La Estraro







Schleyer

## KURIOZAĴOJ EL LA LETEROJ DE ZAMENHOF

**Al Schleyer, 27. XI. 1887.**

Estimata kaj estiminda sinjoro!

Mi sendas al Vi la frukton de mia longa laborado; ĝi estu signo de mia profunda estimo por la nobla idealisto, kiu laboris por la homaro ne timante la ridegon de l'amaso. Mi mem plej bone komprenas kiom Vi devis suferi, ĉar mi mem trairis similan vojon: kiam mia laboro jam estis preta, mi kvar jarojn devis atendi kaj esti celo de senĉesa ridado, - ĝis mi ricevis la eblon eldoni mian verkon.

Kiam mi antaŭ 5 jaroj aŭdis pri la Volapük, mi ne forĵetis mian laboron, ĉar la konstruo de Volapük ŝajnis al mi ne tute praktika; mi diris al mi ke lingvo tutamonda devas esti antaŭ ĉio komprenebla, kaj la tuta granda materialo, kiu jam per si mem fariĝis internacia, devas resti ne tuŝita. En lingvo, kiu devas fariĝi tutamonda, oni povas krei nur la malgrandan parton, kiu estas malsimila en malsimilaj lingvoj; ĉio cetera devas resti ne tuŝita. Ĉar nenia persono estas tiel leĝdonanta por krei lingvon por tuta mondo laŭ sia volo, kaj tuta vivo de homo ne estas sufiĉa por nove krei la tutan senfinan multon da vortoj de lingvo, kun ĉiuj nomoj de l' landoj kaj urboj, kun ĉiuj senombraj nomoj teĥnikaj ktp.

Mi estimas Vian noblan deziron porti utilon al la homaro; kun plena estimo por la aŭtoro de Volapük, mi laboras ne kontraŭ la Volapük, sed por la ideo. Sankta estas por mi la ideo de lingvo tutamonda, kaj en kiu ajn formo del' homaro ĝin havos, mi estos kontenta kaj feliĉa. Se oni montros al mi ke mia laboro estas malutila al la ideo, mi mem detruos mian laboron, kvankam mi oferis al ĝi la plej bonan parton de mia vivo; se la juĝo de l' mondo estos ne decida, la "Lingvo internacia" restos kune kun la "Volapük", kiel du amikoj, kiuj havas unu celon en la vivo. Aŭ unu de la lingvoj mortos per si mem, aŭ la homaro havos du lingvojn, kaj eĉ tio estos por la mondo multe pli bone, ol resti tute sen lingvo tutamonda.

Pardonu ke mi skribas al Vi en mia lingvo; mi faras ĝin ne pro malĝentilo, sed por doni al Via provon de mia lingvo.


Kun la plej granda estimo
Esperanto.

## SPIRITISMO TRA LA MONDO

Laŭ sciigoj de nia samideano João Silva dos Santos, la 1ª Spiritisma Kongreso de Urugvajo, okazinta en oktobro/2011, en Punta del Leste, estis tre fruktdona, kiam pli ol 4 mil homoj, el 10 landoj, ĉestis la memorindan eventon. Johano, ĉiam uzante belajn esperantajn ĉemizojn, vigle diskonigis Esperanton.

Nome de Eldonejo Lorenz, ni gratulas la noblan fraton pro tiel energia laboro por nia Afero!




Envio estas grava malamiko, kiun vi devas kontraŭbatali en via intima mondo.

Ĝi krude enŝoviĝas en la menson kaj malekvilibrigas la emocion.

Ĝi fariĝas senkompata kontrolilo kaj nesentema submastro.

Ĝi preparas insidojn, venĝas per la penso, per la vorto kaj ago, obstine persekutas vin.


Sennombraj krimoj devenas de la envio, krom tiuj, kiuj ne efektiviĝas.

Envio estas malbona sento, kiu devas esti korektita kaj transformita en kamaradecon kaj kontentecon.

Spirito: *Joanna de Ângelis*
Mediumo: *Divaldo P. Franco*

Vi aŭdis, ke estas dirite:
Amu vian proksimulon, kaj malamu vian malamikon; sed mi diras al vi:
Amu viajn malamikojn, kaj preĝu por viaj persekutantoj.

*Jesuo*



## KURIOZAĴOJ EL LA LETEROJ DE F. V. LORENZ

**Al sr-ro Ismael Gomes Braga, Rio.**

**S. Feliciano, la 29an de Marto 1942.**

Kara Amiko kaj Samideano:

Kore mi salutas Vin kaj Vian ŝatindan Familion, dezirante ĉion bonan.

Dankante, mi sciigas Vin, ke mi ricevis Viajn afablajn leterojn el la 5ª kaj 16ª de la kuranta monato, kaj la ekzempleron de Bh.Gitá, senditan per la aerpoŝto. Mi tuj relegis mian tradukaĵon, komparante la tekston kun la presita, kaj mi tre ĝojas, ke la "pres-diabletoj" ne estis disseminta multajn preserarojn. Mi trovis nur du, nome: sur la paĝo 21ª, ŝloko (=duverso) 51ª: frutoj, anst. fruktoj; kaj sur la paĝo 51ª, en la ĉapitra titolo: vidija, anst. vidja; sed tiu ĉi lasta eraro estas sensignifa, ĉar nur sanskritistoj ĝin malkovros. Tamen, mi devas konfesi ke mi faris du erarojn, ĉe la datilografa transkribo, kaj nature ili troviĝas en la libro, sed ili estos malkovritaj nur se iu kritikisto ilin trovos; estas jenaj: Sur la paĝo 14ª, ŝloko 26ª, kie mi skribis: ekvidis, devas esti vidis, ĉar la verso devas havi 16 silabojn, kaj kun la "ek" havas 17. Kaj sur la paĝo 29ª, en la dua verso de la unua ŝloko, anst. tiu devas esti ĉi-tiu, ĉar sen la "ĉi" estas nur 15 silaboj.

Al srº Coutinho mi skribos kaj dankos, sed hodiaŭ mi ne povas fari tion, pro mia nebona sanstato. Post finigi tiun ĉi leteron, mi devos enlitiĝi kaj trinki kuracilon. Pri la propagando por la Biblio: Mi komprenas kaj pravigas Vin. Nu, ĉisemajne mia babilado estas mallonga. Ĝis revido!

Via dankema amiko kaj samideano,

Lorenz

**JAM ESTAS TEMPO POR REALIĜI!!!**

Ne forgesu, kara ano, ke via jara kontribuo treege helpas nin eldoni spiritismajn verkojn en Esperanto kaj ilin sendi, tute senpage, al niaj eksterlandaj samideanoj. Kaj vi, kara amiko, kiu neniam aliĝis, petu informojn kaj, kun plezuro, ni vin sciigos pri la laboro de nia Eldonejo kaj kion vi, kiel ano, ricevos en la komforto de via hejmo.

Dio benu vin!

**editora_lorenz@uol.com.br**
Tel. (21) **2221-2269**



## LA LEĜO DE AMO

*Antônio Félix da Silva*

"Tion mi ordenas al vi, ke vi amu unu la alian." (Jesuo – Sankta Johano – 15:17) [1]

Nuntempe la homaro marŝas sur la Tero sendirekte kiel forlasita infano. Kion ĝi serĉas?

En multaj landoj ne estas facile vivi pro manko de laboro, libereco kaj loĝejo. Pro tio multaj homoj loĝas en domaĉaroj, tendaroj aŭ surstrate; dum aliaj, loĝas en riĉaj kunregadoj. Tial, ĉie okazas manifestadoj.

La homaro forgesis la vortojn de la Majstro Jesuo, kiu diris: "Amu vian proksimulon kiel vin mem; Faru por la aliaj tion, kion vi volus, ke la aliaj faru por vi..." [2]

Tiuj vortoj "estas la plej plena esprimo de la karitato, ĉar ĝi resumas ĉiujn devojn de la homo al sia proksimulo. Ni ne povus havi pli sekuran gvidilon en tiu direkto, ol prenante kiel mezurilon de nia devo al aliulo tion, kion ni deziras por ni mem. Kun kia rajto ni postulas de niaj similuloj pli bonan konduton, pli da indulgemo, da bonvolemo kaj sindonemo, ol tiaj, kiajn ni havas por ili? La praktikado de tiuj maksimoj kondukos al la detruo de la egoismo; kiam la homoj prenos ilin kiel regulon de sia konduto kaj bazon de siaj institucioj, ili komprenos la veran fratecon kaj faros, ke la paco kaj la justeco regu inter ili; ne plu estos malamoj kaj malkonsentoj, sed unueco, konkordo kaj reciproka bonvolemo."

Mi opinias ke la Amo estas la solvo por la paco en la mondo ĉar ĝi estas la plej altgrada sento. Se mi amas kaj ankaŭ vi amas, ni havas bonan konduton; ni estas indulgemo kaj oni ne permesas ke aliuloj ne laboru pro manko de laboro; ne estu libera pro manko de libereco; ne staru surstrate pro manko de loĝejo; kaj ne manĝu pro manko de manĝaĵo.

Mi opinias ankoraŭ, ke se ĉiu homo restos indiferenta antaŭ tiaj mizeroj, baldaŭ la homaro pereos, ĉar sen Amo ne estos vivo; ĉar la estonto dependas de ni.

[1] La Sankta Biblio – (Jesuo – Sankta Johano – 15:17);
[2] Evangelio Laŭ Spiritismo – (Allan Kardec – Ĉapitro XI – N-ro 4).

Feliĉaj la humilaj, ĉar ili heredos la teron.

*Jesuo*

LORENZ

**SPIRITISMA ELDONA ASOCIO F. V. LORENZ**

Rua Francisco Vale, 57, Engenheiro Leal
Rio de Janeiro CEP 21370-171


Tel. (21) **2221-2269** <editora_lorenz@uol.com.br>

# OMAĜO DE LORENZ AL ZAMENHOF

ZAMENHOF, kara majstro, kiam ni pensas pri vi kaj via energia laborado, ne nur por la solvo de la lingva problemo, sed, precipe, por la paco kaj konkordo tersurface, ni pensas pri Giganto, kiu neniam forlasis la celon helpi la homaron, malgraŭ ĉiaj malfacilaĵoj. Ni, modestaj sekvantoj de viaj sublimaj paŝoj, levas niajn pensojn kaj vin dankas pro viaj noblaj ekzemploj.

Vivu la 15-a de decembro! "Vivu, kresku kaj floru la Verda Standardo!" (L. L. Z)

*La Estaro*
*Eldonejo Lorenz*




## BKE

ALPROKSIMIĜAS la plej grava evento de la Esperantista Movado en Brazilo: de la 15ª ĝis la 19ª de januaro, la esperantistaro renkontiĝos por festi la 47an Brazilan Kongreson de Esperanto, okazonta en Taguatinga.

Kiel ĉiujare okazas, Eldonejo Lorenz partoprenos: en la 14ª, ĉe la kunsido de Lorenz, Elmir dos Santos Lima prelegos pri la temo *Materia Karito kaj Morala Karito,* la 17an, je la 14ª h.. En sekvanta tago (18), je la 20ª h.., José Passini prelegos pri Esperanto ĉe Spiritisma Centro Domo de la Vojo, Strato QNJ 10, Área Especial nº 6, Taguatinga Norte.

Ni pliatentigas, ke la lorenzanoj organizos la tradician budon kaj la Estaro garantias malmultekostajn prezojn! Alia interesa momento estos la lanĉo de *Almanako Lorenz 2012*, kiam ni efektivigos la aŭtografan momenton.

"Feliĉaj la kompatemaj, ĉar ili ricevos kompaton".
*Jesuo*




*Kio estas Spiritismo* estas la titolo de la senpaga libro de ĉi monato. Se niaj karaj ekster brazilaj samideanoj interesiĝos, petu kaj vi ĝin ricevos.

KIO ESTAS SPIRITISMO estas verko ĉiam aktuala, utila, tiel al adeptoj de la Spiritisma Doktrino kiel ankaŭ al tiuj dezirantaj ekscii pri la naturo de Spiritismo kaj la defino de ties fundamentaj principoj.

En ĝi evidentiĝas la logiko kaj la natura saĝo de Allan Kardec, kiuj konfuzas la negativistojn kaj respondas la demandojn de kredantoj kaj aspirantoj al la supera vivo.


Ĝi konsistas el 3 ĉapitroj:

La unua, sub la formo de dialogoj kun kritikisto, skeptikulo kaj pastro, liveras respondojn al tiuj nekonataj la bazajn principojn de la Doktrino, krom ankaŭ ĝustaj refutoj al ties kontraŭuloj.

La dua pritraktas partojn de la praktika kaj eksperimenta scienco kaj karakteriziĝas kiel ia resumo de *La Libro de la Mediumoj*.

La tria prezentas resumon de *La Libro de la Spiritoj* kun la solvo, donita de la Spiritisma Doktrino, de problemoj de naturo psikologia, morala kaj filozofia.

En la fino, sub la titolo La Komenco de la Historio, troviĝas resuma priskribo de la signfoplenaj eventoj, kiuj konsistigis unuajn momentojn de Spiritismo en la mondo.


**LANÇAMENTO** **AGENDA BILINGUE PORTUGUÊS-ESPERANTO**

**com várias biografias de eminentes espíritas-esperantistas e, para cada dia, uma mensagem reconfortante dos amigos espirituais.**

**PREÇO DE LANÇAMENTO: R$15,00**
**ACIMA DE 5 UNIDADES, APENAS R$10,00.**

**É o presente antecipado da Lorenz para você!**

**DIVULGAÇÃO**
**CADERNOS DOUTRINÁRIOS**

Jorge Pedreira de Cerqueira

**CIÊNCIA ESPÍRITA**
**Volume 1**
**Espiritismo, Metodologia, Fé e Ciência**




**DUAS OBRAS PELO PREÇO DE UMA** LORENZ

**FILOSOFIA ESPÍRITA**
**Volume 2**
**A Caminho do Mundo de Regeneração**

*PREÇO ULTRAPROMOCIONAL:* **R$15,00**
*Não deixe para depois. É promoção limitada.*